

# **EAB INTERMEDIATE EXAMINATION**

## **EXAM BOOKLET**

### ***(Specimen Paper)***

*The actual exam booklet is the property of Esperanto-Asocio de Britio. You should return it, along with your answer sheets, after the exam. Please do not write on, or make copies of, that booklet.*

*You may spend as many hours as you need to answer the questions, but you must return your answers by the deadline set, which is a month after the paper was sent to you.*

*Please write or type your candidate number (not your name) on every page of your answer-sheets. Write or type on only one side of each page, with an empty right-hand margin of at least 5 cm. If you write your answers by hand, clearly strike out any errors with a single stroke.*

*You are allowed to use dictionaries and other reference books, but you are not allowed to receive help from any other person, and are not allowed to use any computer translation programs. You must sign the declaration form, to be returned with your answer papers, to confirm that your answers are all your own work.*

*You should attempt to answer all five parts of the exam. The marks for these are shown overleaf.*

## INTERMEDIATE EXAM: SPECIMEN PAPER



© **Esperanto-Asocio de Britio**,  
Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent, Staffordshire, ST12 9DE

Tel: 0845 230 1887 or +44 (0)1782 372 141

[esperanto.org.uk](http://esperanto.org.uk)

Text extracts are © their respective authors or publishers

*EAB Intermediate Examination - Exam Booklet (Specimen Paper)*

*You should attempt to answer all five parts of the exam,  
which have these maximum marks:*

<i>Part 1</i>	<i>Esperanto to English Translation</i>	<i>50</i>
<i>Part 2</i>	<i>Esperanto to English Translation</i>	<i>50</i>
<i>Part 3</i>	<i>Summary in Esperanto</i>	<i>50</i>
<i>Part 4</i>	<i>Esperanto Composition</i>	<i>100</i>
<i>Part 5</i>	<i>English to Esperanto Translation</i>	<i>50</i>
<i>Total</i>		<i>300</i>

*The thresholds are:  
45% PASS, 60% MERIT, 75% DISTINCTION.*

## **PART 1: ESPERANTO TO ENGLISH TRANSLATION**

***Translate the following passage into good English:***

### La Kultura Valoro de Tradukoj

Estas superflue diri, ke longe antaŭ ol UNESKO lanĉis en 1956 tiun grandan, dekjaran projekton por antaŭenigo de reciproka aprezado de la kulturaj valoroj de Oriento kaj Okcidento, ni agis per niaj modestaj, preskaŭ nulaj rimedoj, ne helpataj de kiu ajn, sed inspirataj de niaj fido kaj idealismo, por esence sama celo ...

Kiam UNESKO publikigas verkojn el la araba aŭ el la ĉina originaloj en la franca aŭ angla tradukoj, ĝi sendube faras utilan laboron, sed efektive per tio nur riĉiĝas la jam riĉaj angla kaj franca literaturoj. Por Svedo, Bulgaro, Japano kaj sennombraj aliaj tiuj tradukoj en lingvoj nekonataj al ili diras same tiel nenion, kiel la originaloj en egale nekonataj lingvoj. Tial tiaspecaj nacilingvaj tradukoj neniel helpas la aprezadon de la juveloj, kiujn ili entenas, fare de alilingvanoj. Male, la Esperantlingva traduka literaturo kvankam ankoraŭ malgranda sed tamen bela mozaiko, konsistanta el multkoloraj altvaloraj ŝtonetoj alportitaj el diversaj naciaj kulturoj, estas principe egale alirebla al ĉiuj: al japano kaj anglo, al ĉino kaj ruso; al hungaro kaj marokano. En tio konsistas la grandeco kaj supereco de la laboro farata sur tiu kampo pere de la Internacia Lingvo.

From *Elektitaj paroladoj kaj prelegoj* of Dr Ivo Lapenna  
(50 marks)

## **PART 2: ESPERANTO TO ENGLISH TRANSLATION**

***Translate the following passage into good English:***

### La Servisto

Leŭtenanto Petroff singlarde, iom post iom, ŝovis la kapon el sub la lana kovrilo, ĉirkaŭrigardis. Hela taglumo en la ĉambro. Ekstere sennuba ĉielo. Verŝajne frostoj. Li rigardis la termometron.

La enĉambra temperaturo estis dek kvin gradoj super la nulo.

– Brrr! Nur dekkvin gradoj ... Ekstere estas certe minus dudek kvin ...

Aperis antaŭ li la ekzercejo. Liaj dentoj ekklaketis. Li ĵetis rigardon al la senfajra forno, alian rigardon al la poŝ-horloĝo, vigle tiktakanta sur la apudlita ŝranketo kaj poste, kovrante sin per la lantukego li kuntiriĝis kiel piktuŝita raŭpo sub brasikfolio.

Ankoraŭ tro frue ... estus bone dormeti iom! – kaj por pruviti li forte fermis la okulojn.

Senbrue, kiel ombro, ŝtelis sin en la ĉambron lia servisto, Miĥaelo Mihok, pala stangstatura militkaptito. Sub la dekstra brako li premis al si faskon da ligno, sub la maldekstra – pajlaĵon en malnova gazeto, kaj en la manoj li tenis grandan samovaron. Li penadis paŝadi laŭeble senbrue kaj piedpinte. Ĉe ĉiu paŝnaro, glastinto, kulerfalo, seĝrenverso li time kaj respektplene palpebrumis al la lito, kie sub la kovrilo, kvazaŭ minace, montetiĝis la grasa kaj nenomebla parto de la sinjoro leŭtenanto.

From *Dancu marionetoj* by Julio Baghy  
(50 marks)

### **PART 3: SUMMARY IN ESPERANTO**

***Read through the following passage very carefully. Do not write a translation of it. When you think you have thoroughly understood it, write a summary of the main points in Esperanto, using not more than 100 words:***

#### La juĝmaŝino

Iu aktoro persvadis sian patron testamenti sian tutan havaĵon al li kaj kontraŭ tio li konsentis ĝismorte nutri kaj flegi lin; la testamenton li deponis ĉe publika notario kaj post kelkaj semajnoj la aktoro mortigis sian patron. La murdon li aranĝis tiel, ke la suspekto direktiĝis kontraŭ lia frato. Samtempe li zorgis pri sia preciza alibio.

La juĝmaŝino tamen elspuris la veron, la aktoron deklaris krimulo kaj la fraton absolvis. Ĉio tio ankoraŭ estas tute korekta, la maŝino estis tiucele farita. Sed la maŝino krom la diritaj konstatis ankaŭ tion, ke la advokato de la aktoro konis la veran situacion kaj tamen li ne transdonis al la juĝmaŝino la dokumentojn pri la kulpeco de sia kliento; eĉ pli, li klopodis tiel ŝajnigi la cirkonstancojn, kvazaŭ la murdisto estus senkulpa. Pro tio ĉi la maŝino deklaris lin komplico.

Simila okazo ankoraŭ ne troviĝis en la historio ... La advokato protestis per voĉo tremanta pro la indigniĝo; li menciis la advokatan sekretdevon kaj la laŭleĝan helpodevon al sia kliento, rimarkante, ke ĉio, kion li faris, estas honesta tasko de lia profesio ... Li deklaris, ke ĝuste la dekreto de la juĝmaŝino estas kruela insulto ne nur al la jurisprudenco, sed ankaŭ al la plej simpla, justa kaj laŭleĝa pensmaniero.

Konsiderante, ke la advokato protestis jam ankaŭ kontraŭ la konstato de la situacio, la juĝmaŝino ne donis verdikton, sed la procesulojn direktis al apelacio ...

La kontroljuĝmaŝino konstatis la saman kaj la aktoron kaj la advokaton kondamnis al – kuracado ... Post kvin minutoj

ambaŭ kuŝis sur la tabloj de la kuracmaŝino, la metalbrakoj alpremiĝis kaj post aliaj kvin minutoj ili povis foriri.

Sekvontage la aktoro pendigis sin ... La advokato transdonis sian kancelarion al sia helpisto kaj peticiis ĝardenistan postenon de la urba magistrato.

Adapted from *Maŝinmondo* by Sándor Szathmári  
(50 marks)

## **PART 4: ESPERANTO COMPOSITION**

**Write 400-500 words in Esperanto on one of the following:**

- Lingva diskriminacio
- Antaŭjuĝoj
- Taglibroj
- Kiel sukcesigi Esperanton

(100 marks)

## **PART 5: ENGLISH TO ESPERANTO TRANSLATION**

***Translate the following passage into good Esperanto:***

It was impossible for Jennifer to stay in her room that evening; she was too worried and restless. She had her tea in an abstracted daze, and walked across the heath and took a train for Charing Cross ... It was not raining but the night was cold and windy; the chilly draughts whipped around her on the platform in the darkness. In Australia it would be high summer ...

The train was unheated owing to fuel shortages, and she was very cold by the time she got to Charing Cross. She went out of the station and turned eastwards up the Strand, and there she met a disappointment. She had hoped that the bright lights and the traffic would be stimulating and cheerful, and that England would hold out a hand there for her to hang on to. But the shop windows were all dark because of fuel rationing, and the Strand seemed sombre and deserted, with little life.

***[Hints: Charing Cross is a London railway station, and the Strand is a street in London. You do not need to translate those place-names.]***

From *The Far Country* by Nevil Shute  
(50 marks)

*When you have completed all five parts of the actual exam, you should check that:*

- *you have written your **candidate number** on **each** page of your answer-sheets;*
- *you have **signed** the declaration form, to show that your answers are your own work;*
- *you are returning, to the exam administrator at the address on the cover page:*
  - (1) the declaration form,*
  - (2) all of your answer sheets,*
  - (3) the exam booklet.*

# INTERMEDIATE EXAM: SPECIMEN PAPER